



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 3-a de Majo 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Matilda Landaŭ, Eran Vodevoz, Gabi Zeevi. Gasto: Joela.

Protokolo de la antaŭa kunsido (5-a de aprilo 2016) – ĉu estas rimarkoj?

1. Klubejo

- a) Nova klubejo: WIZO (Jehoŝua) - La kosto estos 1000 (ĉu inkl. VAT aŭ ne?) por la pli granda salono (kaj ne 500 kiel antaŭe buŝe interkonsentite!). Estis decidite rete prokrasti nian transiron ĝis post la LK.
- b) Kiam translokiĝi? Komence de julio? En septembro (festoj)? Decido: ni faros nian unuan kunsidon tie la 4-an de julio (pro diversaj konsideroj). *Voĉdono: unuanime!*
- c) Jehoŝua renkontos la dommastron antaŭe, kaj faros la kontrakton kun li.
- ĉ) Propono: konsideri okazigi estontajn ZV-ojn kaj LK-ojn en la regula ĉambro de WIZO (30-40 personoj) por eviti la altan koston. Ni ankoraŭ pripensos!
- d) Parkado - kio pri parklokoj, aldone al la unu promesita? Meti en la kontrakton!

2. Landa Kunveno (somera):

- a) Miĥal petis la salonon de Bikurej Haitim por la 21.6, kaj Ariela aprobis.
- b) Necesas ekpensi pri programo (Matilda).

3. Proponoj de Ŝlomo

- a) Dungi oficejon de publikaj rilatoj: Ŝlomo parolis kun 4 grandaj oficejoj. Ili petas 6500, 7000, 8000 siklojn monate, minimume dum unu jaro. Eble konsentos al 4000 por duonjaro. Reagoj: tro alta kosto kaj ne estas garantio ke profesiulo sukcesos interesigi la publikon pri E-o pli ol okazas jam aŭ reta kaj alia agado kiun ni povas mem pripensi senpage. *Voĉdono: 4 kontraŭ, 2 por, 1 sindeteno. Rifuzita!*
- b) Kvaronjara plano kaj buĝeto kaj rezulto – *disdonita!*

4. Subvencio por la KD de Ŝoŝia/Amir

- a) Kosto: ĉ. 8000 NIS, Ŝoŝia preskaŭ finis registri, Amir preparas la grafikon. Ŝlomo jam transpagis 2000 al la registristo Ofer laŭ la indiko de Ŝoŝia.
- b) Ŝoŝia petas plialtigi la subvencion, ĉar la restanta sumo estas tro alta por ŝi. Estis proponita reta voĉdono kiun partoprenis malmultaj, kaj estis diversaj opinioj, tial la decido estis prokrastita al la kunsido. *(la rete senditaj opinioj, mesaĝoj estis disdonataj dum la kunsido, ankaŭ de ne-ĉeestantoj, kiel Miĥal, Eldad, Doron).*

2/...



c) Ĉu la vendoj kovros la investon? Eble parte, en pluraj jaroj. Vendoprezio: ĉ. 10 eŭroj, eldonkvanto 100, do por kovri plene necesos vendi la tuton kaj reeldoni, kio estas malverŝajna. Sed plene kovri la investon ne devas esti nia sola motivigo por produkti esperantaĵojn. ĉ. Kiel dividi la enspezojn el la vendoj? (propono de Gabi: duone/duone inter Ŝoŝia kaj ELI). Resumo: la subvencio de ELI plialtiĝos al 4000 sikloj, la enspezoj dividiĝos po duone, ELI administros la vendadon de la 100 diskoj (minus kelkaj por la verkistoj). *Voĉdono: unuanime!*

5. Raporto kaj financa rezulto de la Israela Kongreso - (Amri)

- a) Partoprenantoj - Entute partoprenis 54, el ili 7 eksterlandanoj, 28 tranoktis en la hotelo en 14 ĉambroj.
- b) Dokumentoj: Amri preparis programbroŝuron kun partoprenlisto disdonita al ĉiuj tranoktintoj de la hotelo, kaj al eksteruloj. Nomŝildoj: grafiko - Jael, preparado - Amri
- c) Manĝoj: ĵaŭde: okazis miskompreno de Nava pri la restoracio Jonas, ĉar ekzistas du samnomaj. La distanco kaj la prezo estis multe pli ol ŝi diris. La preza problemo estis solvita per surloka improvizo (vegetara menuo anstataŭ vianda) sed la distanca problemo (45 min anstataŭ 5 min) kaŭzis grandan malfruon en la vespera programo. Subvencio de ELI: 32x35 NIS. Amri pagis kreditkarte kaj rericevis ĉekon de ELI.
- ĉ) Manĝoj vendrede vespere (en la hotelo, oni devis mendi ĝis 1.4). Laŭ indikoj de la membroj mendis 20, efektive pagis nur 4, (ELI devus pagi 110x16 NIS) - efektive ELI pagis nur por 14 manĝoj, ĉar la hotelo cedis du pro miskompreno kun la ĉebro de Gabi. El tiuj 14, kvar manĝojn ni anticipis decidis subvencii, du ne venis pro miskompreno (MBP), restas 8 kiuj indikis ke manĝos sed efektive ne pagis kaj ne aperis. Konkludo: estonte en tia kazo ni devos postuli anticipan pagon. Jehoŝua pagis kontante al la hotelo 20x110=2200 NIS el la kongresa kaso, la hotelo ankoraŭ ŝuldas repagon de 220 por Gabi interkonsentite inter Amri kaj Anat (la hotel-ĉambroestrino).
- d) Antaŭkongresa ekskurso: Partoprenis 3. Jehoŝua kaj Amri ĉiĉeronis. bilanco: enspezoj 300x3 eŭroj=4700NIS (1 pagis kontante kaj 2 al UEA-konto de ELI). Elspezoj: kovro de elspezo kaj rekompenco por Jehoŝua (900) kaj Amri (ĉ.1600) laŭ kvitancoj, sume ĉ. 2500 NIS, tranoktado en Port Inn, Haifa: 1226 NIS. Gajno por ELI: ĉ. 1000 NIS.
- e) Postkongresa ekskurso: Partoprenis 6, Nava kaj Eran helpis pri la transportado en la komenco, ĉar estas nur 4 lokoj en la aŭto de Amri. Poste ili daŭrigis per aŭtobusoj kaj taksioj. Buĝeto: en/elspezoj rekte per la organizanto, ne enmiksite en la kaso de ELI.
- f) Repago al Kajto: la prezo de la ĉambro en la hotelo kaj la prezo de la ĉambro de Spinola, kiuj antaŭpagis al ELI - pagita de Amri per ĉeko de ELI. La flugelspezoj: 2x358 eŭroj. Ili interkonsentis kun Amri ke li uzu tiun sumon por kovri iliajn elspezojn en la postkongreso, do ELI transpagu la 716 eŭrojn al la UEA-konto de Amri. Jehoŝua pruntis al ili 200 NIS de la kongresa kaso, kio kovras ilian pagojn por la aŭtobuso de Eilat al Tel Avivo (148 NIS) kaj taksio en Eilat (50 NIS).

3/...



g) Provizora buĝeto: Enspezoj: programkotizo 2750 (24x100+7x50), antaŭkongreso +1000
Elspezoj: Kajto (flugo 716 + hotelo 320 eŭro) ĉ. -4450, Ĵaŭda vespermanĝo -1100, vendreda
vespermanĝo 14x110= -1540. Sume ĉ. -3340 NIS.

h) Raportado: Amri sendis artikolojn pri la Kongreso por Esperanto, Ondo de E-o kaj E-o en Azio.
Nelly sendis longan artikolon por IE pri la Kongreso kaj la ekskursoj. Indas aldoni la artikolojn al
al la IK-retpaĝo (Amri sendos al Dror).

6. Dratverejo

Serĉo de nova luanto: Eran rekomendis dungi makleranton. Ĉu indas? (unuflanke, li prenos unu
monatan makleraĵon de la luanto, aliflanke, li pli efike laboros). Gabi - anonco en Jad2?

*(ĝisdatigo: la anonco aperis en Jad2, kun fotoj, ĝis nun legis ĝin pli ol 650 homoj, ĉ. 5 interesiĝis,
kaj Jehoŝua jam interkonsentis pri vizitotempo kun kelkaj interesiĝantoj).*

7. Retejo de ELI

a) Propono de Oded forlasi la forumon Tapuz pro la reklamoj - ke ELI kreu novan forumon.
Reagoj: ne estis subteno por forlasi la forumon de Tapuz ĉar ĝi estas tre konata kaj atingas multajn
personojn, male nova forumo kiun ni konstruus alogus malmultajn! Eldad kaj aliaj kritikis la
agadon de Oded kiu skribis pri la plano forlasi la forumojn de Tapuz en tiu forumo mem - tio
povas damaĝi la bonajn rilatojn de Eldad kun la Tapuz-mastrumantoj, samkiel antaŭ du jaroj ili
maldungis Miĥal de la direktorado de alia forumo pro simila fuŝo.

b) Eran: valorajn materialojn el la forumo indas konservi ankaŭ en nia retejo.

La venonta kunsido: marde, la 7-an de junio 2016, je 19:30 (*en la malnova loko!*)

Protokolis: Gabi Zeevi